

Johann Wolfgang von Goethe,

Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj  
Trankvil',  
Kaj ĉiuj fontoj  
Sen babil';  
Aŭdas vi ne  
Birdetan ĉirpon arbare.  
Pensu prepare  
Pri la pere'!

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

*Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

*Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingo  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.*

Johann Wolfgang von Goethe,

Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas  
Kviet',  
Kaj ne moviĝas  
Pro ventet'  
Iu foli';  
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.  
Atendu – baldaŭe  
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)